

Kiajn servojn la esperanto-instruado povos alporti al tiu
de la franca lingvo por franclingvaj gelernantoj, 3-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 648, 1976.03.10 & 13

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En sia argumentado favore al la enkonduko de esperanto en la programojn lerneajn la esperantistaro ĝenerale asertas, ke la instruado de la zamenhofa lingvo faciligos tiun de la gepatra lingvo. Sed bedaŭrinde ili ne kapablas diri, kial kaj kiel tio estas ebla. Ilia aserto restas plej ofte speco de slogano.

A.- Dum prelegaro ni provos konkrete demonstri, kiajn servojn la esperanto-instruado povos alporti al tiu de la franca lingvo por franclingvaj gelernantoj. Du elsendojn ni dediĉis al la peresperanta instruado de la franclingva vortaro kaj de ties ortografiado. Hodiaŭ ni demonstros, kiajn servojn la peresperanta instruado povos alporti al la lernigado de la franclingva konjugacio.

Cl.- Dum multaj jaroj la franclingvanoj konjugacias verbojn laŭ la lerneaj kutimoj. Entute milojn da horoj oni dediĉas al la asimilado de la kaosa franca konjugacio, kaj, malgraŭ tio estas tre facile al gramatikistoj fari demandojn pri la francaj verboj al kiuj instruistoj aŭ sekretarioj ne ĉiam povos respondi kun certeco. La peresperanta instruado de la franca konjugacio ne povas ŝanĝi tiun ĉi situacion, sed ĝi tamen povas alporti pozitivajn rezultojn palpeblajn.

A.- Ĝenerale la infanoj konas pli da verbaj formoj, ol la studitajn laŭ la lerneja programo. Ekzemple infanoj konstante parolas helpe de la tempo nomata *passé composé*, kvankam la studado de tiu ĉi tempo malfrue enskribiĝas en la programoj pro la komplekseco de la participa akordiĝo. Infanoj uzas la modon kondicionalo du aŭ tri jarojn antaŭ ol ili ĝin ekstudos. Pro tio ili fuŝuzas ĝin, kaj poste ili malfacile kapablas rezigni je kontraŭgramatikaj uzoj.

Cl.- Por povi regi la franclingvan konjugacion laŭ la klasikaj instrurimedoj oni devas asimili sufiĉe abstraktan terminologion. Oni parolas pri la unua, dua kaj tria personoj de la singularo aŭ de la pluralo, pri tempoj, modoj kaj participoj, pri pronomoj, radikoj kaj finaĵoj, pri verboj regulaj kaj neregulaj, pri la konjugaciaj familioj, ktp. La infanpsikologio tre foras tiun ĉi gramatikan mondon. Tamen la infanoj almenaŭ parole ekde la lerneja periodo ne tro fuŝe regadas la francan konjugacion.

A.- La peresperanta instruado de la franclingva konjugacio permesas fari komparojn inter la ege simpla kaj regula konjugacio de esperanto kaj la pli kompleksa kaj neregula verbuzado de la franca lingvo.

Cl.- Kiuj faris tiun ĉi kompar-eksperimenton, tiuj tuj konstatis, ke la infanoj ekde la naŭa jaraĝo rapide perceptas la semantikan rolon de la esperantaj verb-finaĵoj, kiuj konkretigas verbajn nociojn. Ili ankaŭ konstatis, ke tre rapide la infanoj naŭjaraj kapablas traduki el esperanto francen kaj inverse verbajn formojn, kiujn ili neniam studis ĝis nun. Fine ili rimarkas, ke por infanoj iom kutimintaj al la esperanta konjugacio estas multe pli konkretaj la nomoj i-formo, as-formo, is-formo, os-formo, us-formo kaj u-formo, ol la nomoj infinitivo infinitif, prezenco présent, imperfekto imparfait, futuro futur, kondicionalo conditionnel kaj subjunktivo subjunctif, kiuj longe restas barbaraj vortoj.

A.- Uzante la peresperantan instruadon oni rezignas je la latin-devena nomenklature kaj oni proponas al la infanoj tradukekzercojn.

Cl.- La lernanto rapide lernas, ke al unu propozicio esperanta kelkfoje respondas pluraj eblecoj en la franca, kaj ke nur la kunteksto permesos decidi, kiu traduko estas la bona. Tio ĉi estas granda malkovro lingva.

A.- Ekzemple la propozicion **vi manĝis** oni povas traduki francen per **tu as mangé, vous avez mangé, tu mangeais, vous mangiez, tu mangeas** kaj **vous mangeâtes**. Kaj la propozicion **ni kalkulas** oni povas francigi per **nous calculons** kaj **on calcule**.

Cl.- La lernantoj malkovras, ke la franca propozicio **on calcule** ankaŭ signifas en esperanto **oni kalkulas**. On calcule povas do signifi ĉu **oni** aŭ **ni kalkulas** laŭ la kunteksto. Ni estas konstante en la realeco, dum la klasika konjugacia instruado apartigis lingvan fenomenon de la realeco, pro tio ĝia efiko estas tiel eta.

A.- En la konjugacia leciono la lernanto fine skribos **vous faites, vous dites**, sed parole kaj verke li daŭre diros aŭ skribos **vous fesez** kaj **vous disez**, kiuj restis pli realaj. La peresperanta instruado, kiu permesas meti la akcenton je la malfacilaj propozicioj kaj eviti la tempoperdan kaj rutinan konjugacian laboron, reliefigas la neregulaĵojn de la franclingva konjugacio kaj permesas tre rapide doni al la gelernantoj superrigardon pri la tuta franclingva konjugacia sistemo, inkluzive la tempojn *passé simple* kaj *passé composé*. La observado montras, ke en la tempo *passé simple* restis vivantaj nur formoj kiel **il** aŭ **elle raconta**, kaj **ils** aŭ **elles racontèrent**, sed ke en la parola uzo oni preferas la tempon *passé composé* **il** aŭ **elle a raconté**, **ils** aŭ **elles ont raconté**. Nur la tradukado de kompletaj frazoj permesas tiun ĉi observadon.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!